# BULTENO

## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**N-ro 37** **Junio** **1930**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE



**TEKSTO : La morto de S-ro Thorberg — La administra konsilantaro kunvenis en Paris — Internacia Labora Konferenco kaj deviga laboro — La apliko de la internciaj laboraj konvencioj — La demando pri laborhoroj de oficistoj — Ratifikoj — Aprobo de konvencioj — La norvegaj maristoj kaj la konferenco — Laborhoroj — Senlaboreco — Decidoj de la Administra konsilantaro pri la programo de konferenco — Paĝo pri Kooperado.**


### La morto de Sro. THORBERG,

**membro de la Ádministra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo.**

Oni anoncis de Stockholmo la subitan morton de S-ro Arvid Thorberg, Senatoro, Prezidanto de la Sveda Ĝenerala Federacio de Laboro, kiu kolapsis je la konkludo de parolado en la Senato pri senlaboreco. S-ro Thorberg, kiu estis unu el la plej eminentaj personoj en la labormovado de Norda Eŭropo, estis depost 1920 membro de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo. Kiel delegito de la Svedaj laboristoj, li partoprenis en preskaŭ ĉiuj kunsido, de la Internacia Labora Konferenco. Per siaj rimarkindaj intelektaj kapabloj, liberalaj opinioj kaj forta karaktero li akiris nedisputeblan aŭtoritaton en la Organizajo.

*La Administra Konsilantaro kunvenis en Paris.*

Invitite de la Franca Registaro, la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo kunvenis de la 24a al la 30a de Aprilo en Paris. Tie ĝi solenis la dekan jarrevenon de sia unua kunsido, kiu okazis ankaŭ en Paris de la 26a al la 28a de Januaro 1920.

La Administra Konsilantaro estis elektita, la unuan fojon, en Washington, de la unua Internacia Labora Konferenco, en Novembro 1919. En Paris, en Januaro 1920, la Konsilantaro komencis la organizon de la Internacia Laboroficejo, kiu estis provizore loĝita en la Hôtel Astoria, kiun la Franca Registaro bonvole disponigis al ĝi. La Oficejo estis poste translokita al London kaj definitive starigita en Genève la 14an de Julio 1920.

En Paris ankaŭ kunvenis, de Februaro al Aprilo 1919, la Komisiono pri Internacia Labora Leĝdono, elektita de la Packonferenco. De la laboro de tiu Komisiono rezultis la Parto XIII de la Packontrakto, kiu kreis la Internacian Laboran Organizajon.

*La Internacia Labora Konferenco kaj deviga laboro.*

La Internacia Laboroficejo jus prezentis al la Registaroj de la Ŝtatmembroj de la Internacia Labora Organizajo la raporton pri deviga laboro preparitan por la diskuto de tiu demando en la sekvonta kunsido de la Konferenco, kiu kunvenos la 10an de Junio en Genève.

La demando estis diskutita la unuan fojon en la dekdua kunsido de la Konferenco, en Junio 1929, kiam oni decidis, ke ĝi estu enmetita en la tagordon de la sekvonta kunsido por dua kaj definitiva diskutado. Laŭ la kutima proceda, la Registaroj estis intertempe konsultitaj per demandaro.

La lastjaraj diskutoj havis reagojn en pluraj landoj kaj elvokis diversajn opiniojn pri la oportuneco de iuj internaciaj decidoj pri tiu temo. La kontraŭa opinio estis tre forte esprimita de multaj interesatoj. Estas do tre rimarkinde, ke la respondoj de la Registaroj al la demandaro preskaŭ ĉiuj aprobas la adopton de internacia konvencio pri deviga laboro. La opinioj de la koloniaj Potencoj iom diferencas pri la amplekso kaj formo de la konvencio, sed nur unu opinias, ke la akcepto de tia konvencio ne estas necesa. La Registaroj de Ŝtatoj ne posedantaj koloniojn ĝenerale ne respondis detale al la demandaro, sed aprobis la celojn de la proponita konvencio.

Sur la bazo de la respondoj de la Registaroj, la Internacia Laboroficejo preparis, por prezentado al la Konferenco, antaŭprojekton de konvencio pri deviga laboro kaj du projektojn de rekomendoj respektive pri malrekta devigo al laboro kaj pri la reguligo de deviga laboro.

La antaŭprojekto de konvencio starigas la ĝeneralan principon, ke la uzo de deviga aŭ trudita laboro devas esti forigita laŭ ĉiuj formoj, sed permesas la uzon de tia laboro por publikaj celoj dum transira periodo kaj laŭ reguloj difinitaj en la sekvantaj artikoloj de la konvencio. Grava artikolo de la konvencio ordonas la plenan forigon de deviga aŭ trudita laboro por privataj personoj en la limtempo de tri jaroj post la dato de registrado de la ratifiko de la konvencio.

*La Apliko de Internaciaj Laboraj Konvencioj.*

La Komitato de Spertuloj elektita por ekzameni la ĉiujarajn raportojn, prezentitajn de la Ŝtatoj, laŭ artikolo 408 de la Packontrakto, pri la aranĝoj faritaj por efektivigi la Internaciajn Laborajn Konvenciojn, kiujn ili ratifikis, finis sian laboron.

Ĉi tiun jaron 187 raportoj estas ekzamenitaj, kompare kun 223 lastan jaron kaj 175 en 1928.

La Komitato notis, ke la plimulto el la raportoj prezentitaj ne elvokis novajn rimarkojn, kaj ke ĝenerale la aplikado de konvencioj fariĝas pli kaj pli konforma al la tekstoj. Ĝi montris tamen pri iuj raportoj, diversajn punktojn, pri kiuj kompletigaj informoj ŝajnas dezirindaj.

Laŭ invito de la Administra Konsilantaro, la spertuloj faris iujn sugestiojn por la plibonigo de la laboro de la Komitato. La raporto akceptita je la fino de la kunsido insistas pri la grava rolo ludata de la procedo laŭ Artikolo 408, kiel rimedo por certigi reciprokan interŝanĝon de informoj kaj amikan kontrolon, kaj tiel eviti la uzon de la penoj difinitaj en aliaj artikoloj de la Kontrakto.

La sperto de kvar jaroj pruvas, ke la detala kontrolo de la ĉiujaraj raportoj de la Ŝtatoj rezultigas tre kompletan ideon pri la observado de konvencioj en ĉiuj landoj, kie ili estas ratifikitaj.

*La demando pri laborhoroj de oficistoj.*

La Internacia Laboroficejo nun ankaŭ prezentis al la Ŝtatmembroj de la Organizaĵo la raporton pri laborhoroj de oficistoj, preparitan por la diskuto de tiu ĉi demando en la sekvonta kunsido de la Konferenco.

Ĉi tiu demando estis ankaŭ diskutita en la dekdua kunsido kaj enmetita en la tagordon de la sekvonta kunsido por dua kaj definitiva diskuto. La Registaroj estis konsultitaj per demandaro, kaj dudeknaŭ el ili respondis.

El tiuj dudeknaŭ, dekok aprobas la akcepton de projekto de konvencio por internacie reguligi la laborhorojn de oficistoj. Tiuj estas la Registaroj de Aŭstrio, Belgujo, Bulgarujo, Danujo, Finlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Jugoslavio, Kubo, Litovio, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Portugalujo kaj Urugvajo. En iuj kazoj, tamen, rezervoj estis faritaj pri la amplekso de la konvencio.

Du Registaroj, tiuj de Luksemburgo kaj Svislando, preferas Rekomendon sed ne kontraŭstaras principe la ideon pri konvencio. Kvar Registaroj, tiuj de Estonio, Hindujo, la Irlanda Libera Ŝtato kaj Rumanujo difinite favoras Rekomendon.

La Registaro de Siamo diris, ke la demando ne interesas ĝin praktike, ĉar la lando estas esence agrikultura, kaj la nombro da oficistoj ne sufiĉas por pravigi specialajn aranĝojn.

Fine, kvar aliaj Registaroj, kiuj respondis al la demandaro, tiuj de Granda Britujo, Japanujo, Sudafriko kaj Svedujo, ne opinias, ke estas urĝe necese, starigi internacian regularon pri tiu demando, kiu, laŭ ilia opinio, ne estas ankoraŭ matura.

Sur la bazo de tiuj respondoj, la Internacia Laboroficejo preparis, por prezentado al la Konferenco, antaŭprojekton de konvencio pri komercaj establaĵoj kaj oficejoj kaj du projektojn de rekomendoj, unu pri hoteloj, restoracioj kaj similaj establaĵoj kaj alia pri teatroj kaj aliaj publikaj amuzejoj.

La projekto de konvencio ordonas la limigon de laborhoroj al 48 ĉiusemajne. La labortago devas principe esti de 8 horoj, sed la 48 horoj ĉiusemajne povas esti dividataj aliamaniere inter la diversaj tagoj de la semajno, kondiĉe ke la laborhoroj de neniu tago devas superi 10.

Pri hoteloj, restoracioj kaj similaj establaĵoj, kaj ankaŭ pri teatroj kaj aliaj amuzejoj, la rekomendoj proponas ke enketoj estu faritaj pri la nunaj laborhoroj. La rezultatoj de tiuj enketoj estus sciigitaj al la Internacia Laboroficejo en la limtempo de kvar jaroj, kun la celo, ke en iu pli posta kunsido de la Konferenco, projekto de konvencio povos esti akceptita por reguligi la laborhorojn en tiuj klasoj da establaĵoj.

*Ratifikoj.*

La ratifiko per Germanujo de la Konvencio pri Dungokontraktoj de maristoj, akceptita de la Konferenco en la Naŭa Kunsido (1926), estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 14an de Marto 1930.

La ratifiko per Hispanujo de la Konvencio pri la kreado de metodoj pro fiksi minimumajn salajrojn, akceptita de la Konferenco en la Dekunua Kunsido (1928), estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 8an de Aprilo 1930.

*Aprobo de Konvencioj.*

*Italujo.*

La 7an de Marto 1930 la Itala Deputitaro akceptis du projektojn de leĝoj aprobantaj respektive la Konvencion pri kompenso pro laborakcidentoj en agrikulturo, akceptitan de la Konferenco en la Tria Kunsido (1921), kaj la Konvencion pri la kreado de metodoj por fiksi minimumajn salajrojn, akceptitan en la Dekunua Kunsido (1928).

*Hungarujo.*

La 31an de Januaro 1930, la Hungara Ministro de Komerco prezentis al la Parlamento projekton de leĝo por ratifiko de la Konvencio pri la kreado de metodoj por fiksi minimumajn salajrojn. Li ankaŭ prezentis, rilate al la Rekomendo pri la apliko de metodoj por fiksi minimumajn salajrojn, raporton rekomendantan la adopton de tiu Rekomendo.

*Irlando.*

La 7an de Aprilo la Konstanta Delegito de la Irlanda Libera Ŝtato al la Ligo de Nacioj informis la Internacian Laboroficejon, ke la Ministro de Eksteraj Aferoj metis sur la tablo de la Dail (Parlamento), por ratifiko, la jenajn konvenciojn :

Pri Kompenso pro senlaboreco okaze de ŝipopereo ;

Pri Semajna tagripozo en industriaj entreprenoj ;

Pri la Minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro, kiel hejtistoj kaj karbordigistoj surŝipe ;

Pri Deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj servantaj surŝipe ;

Pri Egaleco de traktado por naciaj kaj fremdaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj ;

Pri Simpligo de inspekto de elmigrantoj surŝipe ;

Pri Dungokontraktoj de maristoj ;

Pri Reenpatrujigo de maristoj ;

Pri Kreado de motoj por fiksi minimumajn salajrojn ;

Pri sciigo de la pezo de multpezaj pakaĵoj transportataj surŝipe ;

Pri protekto kontraŭ akcidentoj de laboristoj okupataj pri la ŝarĝado kaj deŝarĝado de ŝipoj.

*Aŭstralio.*

La Ĉefministro de Aŭstralio lastatempe informis la Internacian Laboroficejon, ke oni plie konsideras la demandon pri ratifiko de tri konvencioj, kiuj apartenas al la kompetenteco de la Federaciaj aŭtoritatoj, tio estas la konvencioj pri dungokontraktoj de maristoj, pri reenpatrujigo de maristoj, kaj pri simpligo de inspekto de elmigrantoj surŝipe.

La ĉefministro ankaŭ diris, ke li konsideras, kion oni povos fari pri la aliaj maraj konvencioj, kiuj rilatas al aferoj apartenantaj al la kompetenteco kaj de la Commonwealth (Federacio) kaj de la individuaj Ŝtatoj.

Pri la ceteraj konvencioj, kiuj koncernas aferojn, pri kiuj la povoj de la Commonwealth estas limigitaj, la Ĉefministro diris, ke tiuj konvencioj estas submetitaj al la kondiĉoj de paragrafo 9 de Artikolo 405 de la Kontrakto de Versailles, sed rememorigas la politikon de la antaŭa Registaro, laŭ kiu la Commonwealth estus preta por ratifiki iun ajn konvencion, kies ordonoj estus efektivigitaj per la leĝaroj de ĉiuj Ŝtatoj, kaj pri kiuj la Ŝtatoj estus donintaj asekuron, ke ili ne modifos iliajn leĝarojn, tiamaniere ke ili estu nekonformaj al la konvencio, sen antaŭa dirkutado kun la Commonwealth.

*La Norvegaj maristoj kaj la Konferenco.*

La Centra Komitato de la Sindikato de Norvegaj maristoj kaj hejtistoj, en kunveno okazinta la 18an kaj 19an de Januaro, akceptis rezolucion petantan la Norvegan Konfederacion de Sindikatoj, ke ĝi ŝanĝu sian sintenadon pri partopreno en la Internacia Labora Konferenco kaj sendu delegiton al la sekvonta Mara Kunsido de la Konferenco.

La rezolucio diras, ke la Centra Komitato ĝisnun apogis la decidon de la Konfederacio pri foresto de la Konferenco, ĉar la konsisto de ĉi tiu ebligas, ke konservativaj Registaroj altrudu decidojn konformajn al siaj opinioj. Tamen la

politika situacio en Eŭropo multe ŝanĝiĝis dum la lastaj jaroj, kio montriĝis en la lasta Kunsido de la Konferenco. Kun la konsento de la Brita, Franca, Germana kaj aliaj Registaroj, oni decidis pritrakti la demandon pri laborhoroj de maristoj en la sekvonta Mara Kunsido, kaj ne ekzistas motivoj por kredi, ke la situacio poste ŝanĝiĝos tiom, ke ne estos eble, en tiu Kunsido, akceptigi proponojn por la internacia reguligo de la laborhoroj de maristoj.

La rezolucio tiam memorigas, ke la Internacia Federacio de Transportlaboristoj, en sia lasta Kongreso, esprimis la opinion, ke la Norvegaj laboristoj devus partopreni en la Konferenco, kaj ke, dum kaj post la Konferenco, la foresto de Norvegujo, unu el la ĉefaj maraj Ŝtatoj en Eŭropo, elvokis kritikojn. La Internacia Federacio de Transportlaboristoj faris multon por organizi la internacian opinion de sindikatistoj por la starigo de la 42-hora semajno, sed multaj el la naciaj organizajoj ne estas sufiĉe fortaj por certigi baldaŭan efektivigon de la reformo per tiaj rimedoj. La Federacio tial direktis siajn klopodojn al la efektivigo de la programo per Genève.

En tiuj cirkonstancoj, la Komitato opinias ke estas malprave, ke la Norvegaj laboristoj ne partoprenu en la sekvonta Mara Kunsido de la Konferenco, kaj forte petas la Konfederacion de Sindikatoj, ke ĝi nuligu sian decidon, aŭ almenaŭ faru escepton por tiu Kunsido.

*Laborhoroj.*

*Italio.*

La 7an de Marto la Itala Ministro de Korporacioj, S-ro Bottai, proponis en la Senato projekton de leĝo por reguligi laborhorojn en industriaj entreprenoj. La celo de la projekto estas, ebligi ke Italujo nuligu la rezervojn pri ratifiko per aliaj Ŝtatoj, kiuj kondiĉas la Italan ratifikon de la Washingtona Okhora Konvencio. La ĝenerala efiko de la projekto estas, konformigi la Italajn leĝajn regulojn kun la Washingtona Konvencio.

*Senlaboreco.*

Landoj, en larĝe apartigitaj regionoj de la mondo, suferis dum la lastaj monatoj de industria krizo, kiu montriĝis per pligrandigita senlaboreco.

Konsiderante la ekzemplojn, oni devas ankaŭ memori ke la malvarma vintro de 1929 en Eŭropo produktis grandan sezonan senlaborecon, dum la milda vintro de 1930 rezultigis malgrandan sezonan senlaborecon. Tio faras pli signifa la faktoro, ke la ciferoj por 1930 estas ĝenerale pli altaj kaj ofte multe pli altaj ol en 1929.

En *Germanujo,* dum la unua duono de Marto 1930, estis 2.593.000 (ĉirkaŭ 16 %) senlaboruloj ricevantaj kompenson, kompare kun 2.502.000 je la responda periodo en 1929.

En *Granda Britujo,* la nombro da senlaboruloj la 17an de Marto 1930 estis 1.621.800 kompare kun 1.182.454 la 18an de Marto 1929 kaj 1.127.622 en Marto 1928.

En *Italujo,* la lastaj haveblaj ciferoj rilatas al Februaro 1930 ; kiam la nombro da personoj registritaj kiel tute senokupaj estis 456.628, kompare kun 489.347 en Februaro 1929 kaj 413.383 en Februaro 1928.

En *Polujo,* la nombro da senlaboruloj registritaj en la dungoficejoj estis 287.000 la 8an de Marto 1930, kompare kun 177.000 en Marto 1929 kaj 168.000 en Marto 1928.

En *Usono,* laŭ la statistikoj de la Amerikana Federacio de Laboro, 22 % de la membroj estis senlaboraj en Februaro 1930, kompare kun 15 % en Februaro 1929. Laŭ oficialaj statistikoj, okupado malpliiĝis en Februaro 1930, je 5,3 %, kaj salajro-kontoj je 7,3 %, kompare kun Februaro 1929. La Raportoj de Babson, 17 Marto 1930, kiu donas tiujn ciferojn, diras ke la takso, 3.000.000 senlaboruloj, faritaj de la Sekretario por Laboro, S-ro Davis, estas probable malpli ol la reala nombro, kaj ke ekzistas nenia pruvo de daŭra pliboniĝo dum la sekvintaj tri monatoj. Alia bone konata Amerika organizajo, la Alexander Hamilton Institute's Bureau of Business Conditions, taksas la nombron da senlaboruloj je la sama dato kiel 4.500.000. Alia atesto pri la krizo en Usono estas la fakto ke, en 32 urboj raportintaj al la Family Welfare Association (Asocio pri Familia Bonesto), la nombro da familioj, en kiuj sanlaboreco estis faktoro en la bezono de helpo per la Welfare Societies (Bonfaraj Societoj), pligrandiĝis de 7.300 en Januaro 1929 al 21.600 en Januaro 1930, tio estas pliiĝo je 200 %.

En *Aŭstralio,* laŭ ciferoj eldonitaj de la Sindikatoj, la nombro da senlaboruloj dum la tria kvarono de 1929 estis 52.480 (12, 1 %), kompare kun 47.745 (11,4 %) en la tria kvarono de 1928 kaj 29.991 (6,7 %) en la tria kvarono de 1927.

En *Kanado,* kiel en Usono, ne ekzistas oficialaj statistikoj pri senlaboreco, sed senlaboreco inter membroj de sindikatoj estis 11,4 % en Decembro 1929, kompare kun 6,6 % en Decembro 1928. La indekso pri okupado la 1-an de Februaro 1930 estis 111,6 (mezo por 1926 = 100), kompare kun 110,5 la 1-an de Februaro 1929 kaj 102 la 1-an de Februaro 1928. Konsiderite la pligrandiĝo de la loĝantaro la malgranda pliiĝo de la indekso de 1929 al 1930 montras la ekzistadon de ne malmulte da senlaboreco.

En *Japanujo* estis granda pliiĝo de la ciferoj pri senlaboreco dum la lastaj monatoj. Laŭ enketo farita de la Oficejo de Sociaj Aferoj, ampleksanta 6.941.947 personojn, la taksita nombro da senlaboruloj en Decembro 1929 estis 315.260 (4,5 % de la nombro da personoj studitaj) kompare kun 268.590 en Septembro 1929.

La Monata Revuo de la Midland Bank, London, diras ke la probabla kaŭzo de tiu krizo estas la malpliiĝo de prezoj. La nivelo de pograndaj prezoj falis daŭre kaj tre rapide dum la lastaj monatoj. La tutmonda prezmovado metis tro grandan ŝarĝon sur Grandan Britujon, kaŭze de la diferencoj, pligrandiĝantaj kun ĉiu paŝo en la malaltiĝanta movado, inter pograndaj kaj pomalgrandaj prezoj, salajroj kaj kostoj de varoj kaj servoj en neŝirmitaj, kompare kun ŝirmitaj industrioj. La falo de la prezoj de grenoj kaj aliaj krudaj materialoj ne produktataj en la hejmlando limigas la aĉetpovon de la eksportantaj landoj. La rezultatoj estas evidentaj, ekzemple, en la malfacilaĵoj de Kanado, Aŭstralio kaj Argentino. Tiu ĉi faktoro ankaŭ limigas Britan eksportadon. Bankdeponajoj estas ankaŭ pli malgrandaj ol antaŭ unu jaro. Estas do malpliiĝo de la valuta-volumo, kune kun malpliiĝo de prezoj, kio estas senduba signo de deflacio. Laŭ la verkisto en la Revuo, Britujo suferas de tutmonda deflacia movado, aliavorte, de pliiĝo de la valoro de oro. Tia teorio ŝajnas esti aplikebla al la situacio en aliaj landoj.

*Decidoj de la Administra Konsilantaro pri la programo de la Konferenco.*

En ĝia Kvardeksepa Kunsido en Februaro 1930 la Administra Konsilantaro ekzamenis la rezultatojn de la Prepara Teknika Konferenco pri la Karbo-minindustrio, okazinta en Januaro. Ĝi decidis : ke la demando pri laborhoroj en karbminejoj estu metita en la tagordon de la 1930 Kunsido de la Internacia Labora Konferenco ; kaj ke la Internacia Laboroficejo prezentu al la 1931 Kunsido raporton pri salajroj en karbminejoj, rilate speciale al la punktoj indikitaj de la Prepara Konferenco.

Pri la dato por la dua diskuto de la demandoj diskutitaj en la Mara Kunsido de la Konferenco en Oktobro 1929, la Konsilantaro decidis por 1931. Tial nur unu Kunsido, la Ĝenerala, de la Konferenco okazos en 1930. Ĝia tagordo enhavos la demandojn pri laborhoroj en karbminejoj, laborhoroj de oficistoj (dua diskuto) kaj deviga laboro (dua diskuto). La Kunsido malfermiĝos la 10an de Junio.

## Rumanujo

*La Kooperativoj de la Lernejoj.*

Raporto kiun lastatempe ricevis la Internacia Laboroficejo de S-ro M. J. Gradinaru, Inspektoro de la Nacia Oficejo de la Rumana Kooperativa Movado, priskibas la historion kaj nunan situacion de la lernejaj kooperativoj en Rumanujo.

La movado devenis de la kutimo, ekzistanta inter la Rumanaj instruistoj, aĉeti kolektive, je la komenco de ĉiu jaro, la librojn necesajn por iliaj lernantoj. Iuj instruistoj decidis doni al la lernantoj la komercajn profitojn de tiu kolektiva aĉetado. Por tiu motivo ili favoris la kreadon de lernejaj kooperativoj. En 1908 la movado estis stimulata de S-ro Spru Haret, Ministro de Instruado, kiu eldonis cirkulerojn difinantajn la gvidantajn principojn por la movado kaj rekomendantajn, ke lernejaj kooperativoj estu tute memvolaj asocioj, ke ili estu organizataj laŭ difinitaj reguloj, kaj ke kompletaj kaj regulaj bilancoj estu ĉiam starigataj. La movado estis interrompita de la Balkana Milito kaj la Mondmilito, sed renaskiĝis en 1925.

Nune 60 lernejoj kooperativoj ekzistas en Rumanujo. La plimulto troviĝas en elementaj lernejoj. Estas tamen unu en liceo, unu en normala lernejo, unu en supera komerca lernejo kaj unu en la Universitato de Bukureŝto.

La celo de tiuj societoj estas ĝenerale la kolektiva aĉeto kaj disdonado de libroj. En la Universitato de Bukureŝto la Kooperativo de la Studentoj ankaŭ administras restoracion kaj barbirejon. La societo starigita en la normala lernejo provizas siajn membrojn per vestoj.

Ĝenerala raporto pri 15 el tiuj societoj montras, ke parto de la profitoj estas dediĉitaj al kolektivaj kaj edukaj celoj (bibliotekoj, ekskursoj, k.t.p.) kaj al helpemaj projektoj (kasoj por malriĉaj lernantoj, k.t.p.).

La Nacia Oficejo de la Kooperativa Movado helpas la movadon per la preparado de regularoj kaj la eldonado de broŝuroj.

*Statistikoj de la Kooperativaj Federacioj en diversaj landoj.*

Kooperativoj konsistantaj el individuaj membroj estas nur la unua grado de kooperado. Tiuj societoj kombiniĝas en regionaj kaj naciaj grupoj, kiuj konsistigas la duan kaj la trian gradon. Tiuj grupoj estas diversaj laŭ strukturo kaj funkcio. Iuj celas edukadon, propagandon aŭ la kontrolon de kontoj. Aliaj havas ekonomiajn celojn, kiel la Pogandaj Societoj de la konsumkooperativoj, la centraj asocioj por vendo aŭ aĉeto de la agrikulturaj kooperativoj, kooperativaj bankoj, centraj asocioj de kreditkooperativoj, k.t.p. Grupoj ankaŭ estis starigitaj por unu sola celo.

La naciaj organizaĵoj estas ankaŭ kombinitaj en la Internacia Kooperativa Alianco. Internaciaj agentejoj estis ankaŭ kreitaj por havigi provizojn aŭ merkatojn por naciaj organizaĵoj.

Parto VI de la Internacia Labora Jarlibro : « Kooperativaj Organizaĵoj », de kiu nova eldono jus aperis, celas priskribi tiun grupon de deferaciaj organizajoj kaj donas riĉan statistikon pri 738 tiaspecaj societoj. Por 272 centraj organizaĵoj la tuta spezo en 1928 estis 10.000 milionoj da dolaroj.

*Hungarujo.*

*La Centra Kooperativa Asocio de Metiistoj.*

Tia Asocio estis starigita en 1924, por provizi metiistojn, organizitajn en kooperativoj, per kredito kaj krudaj materialoj, kaj por helpi ilin aĉeti maŝinaron, trovi laboron kaj vendi iliajn produktaĵojn. La 57 kooperativoj aliĝantaj al la Centra Asocio multe helpas malgrandajn produktantojn dum krizaj periodoj. La Centra Asocio estas la sola fonto de kredito por metiistoj. Sed ĝia kapitalo ne sufiĉas por ĝia celo kaj la Registaro lastatempe decidis pligrandigi ĝin.

La konstanta pliiĝo de la eksporta komerco farata de la Centra Asocio estas rimarkinda. Ekzemple, dum la lastaj du jaroj, la kooperativoj de meblistoj eksportis meblojn por la valoro de 1.680.000 pengoj. Eksportado fariĝas precipe al Italujo, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio kaj Rumanujo, kaj specimenoj de la produktaĵoj estis ankaŭ senditaj al Egiptujo kaj Usono, kun la espero, ke mendoj estos ricevitaj.

La Unuigita Kooperativo de ŝufaristoj ankaŭ eksportas multajn de siaj produktaĵoj.

*Konstruado de kooperativaj magazenoj por grenoj.*

La aranĝoj faritaj de la Registaro por la organizo de kooperativa enmagazenigo rapide progresas. La societoj precipe koncernataj estas la Centra Instituto de Kreditkooperativoj kaj la « Futura » Komerca Kompanio de la Centraj Hungaraj Kooperativaj Unuiĝoj. Tiuj unuiĝoj kunlaboras kun la kamparaj kooperativoj, kiuj vendas la produktaĵojn de la farmistoj. La Centra Instituto de Kreditkompanioj faras enketojn en ĉiu kamparo, kaj se la prezoj ŝajnas esti nenature malaltaj, ĝi tuj faras aranĝojn por plifortigi la merkaton per aĉetado, por pliproksimigi la prezojn al la produktokostoj. La celo de la organizo de kooperativa enmagazenigo estas la konstruado de 500 magazenoj. Ĉiu centra magazeno servos al 5 aŭ 6 vilaĝoj, kaj iom post iom la tuta lando estos provizata per grenmagazenoj. Tio estas despli necesa, ĉar ĉiuj publikaj grenmagazenoj nun apartenas al la grandaj bankoj kaj ne faciligas la enmagazenigon de la grenoj de malgrandaj produktantoj. La agrikulturaj kreditkooperativoj donas pruntojn laŭ tre favoraj kondiĉoj, kontraŭ la garantio de grenoj deponitaj en kooperativaj magazenoj.

*Norvegujo.*

*La Agado de la Kooperativa Unuigo en* 1929.

La jaro 1929 en Norvegujo markis la finon de la longa malprospera periodo, kiu sekvis la postmilitan krizon. Estis la unua kompleta jaro post la stabiligo de la krono. La Unuiĝo kaj Pogranda Organizaĵo de la Konsumkooperativoj pligrandigis sian agadon dum tiu jaro. La tuta spezo pligrandiĝis de 26.467.850 kronoj en 1928 al 29.222.777 kronoj en 1929, tio estas 10,4 %. Samtempe la pogranda prezindekso falis de 157 al 152, tiel ke la reala pliiĝo estis eĉ pli granda.

El la tuta spezo, 8.269.612 kronoj rilatas al la propra produktado de la Unuiĝo. Tio estas parte dank'al la aktiveco de la novaj entreprenoj, tio estas, la farunmuelejo, kiu komencis sian laboron en Junio, la nova margarinfabrikejo, kiu malfermiĝis en Novembro, kaj la ŝufabrikejo, kiu venis sub la administro de la Unuiĝo en Junio.

La tuta produkto de margarino pliiĝis je 11,6 %, de 2.400.000 kg. en 1928 al 2.800.000 kg. en 1929, kaj la valoro pliiĝis de 3.158.068 kr. al 3.375.000 kr., tio estas 10,7 %.

La muelejo muelis 11.300 tunojn da greno, valorantajn 2.839.038 kronojn. La nuna kapableco de la muelejo ne sufiĉas al la postulado, kaj oni jam projektas pligrandigon.

La ŝufabrikejo produktis 74.078 parojn da ŝuoj valorantajn 1.078.298 kronojn.

La spezo de la sapofabrikejo estis 910.806 kronoj, kompare kun 880.000 kr. en 1928.

*(Daŭrigo en venonta N-ro).*

IMP. ALBERT GRANCHAMP. - ANNEMASSE